
# La Nov-Jorkia ESPERANTISTO

ISSN 2573-6108

*Esperantumado en la Imperia Ŝtato*

Volumo 3 Numero 2 Novembro 2019

## Malkaŝita Muziko de Félicien de Ménil

Timoteo Boronczyk, Esperanto-Societo de Sirakuso




La melodio de la kanto *Le Petit Oiseau* de franca esperantisto kaj komponisto Félicien Menu de Ménil (skanaĵo de la Nacia Arkivo de Francujo).

Mi foje pensas pri Félicien Menu de Ménil, la verkinto de la melodio de la esperanta himno, *La Espero*. Kiun alian muzikon li verkis?

Bedaŭrinde, informoj pri de Ménil estas malmultaj, kaj liaj muzikaj verkoj estas apenaŭ troveblaj. Do, kiam mi eksciis, ke rilatajn dokumentojn havas la Nacia Arkivo de Francujo, mi tuj forblovis la polvon de mia franca/angla vortaro kaj skribis retpoŝton al la arkivisto, petante kopiojn.

Post kelkaj semajnoj (kaj eŭroj) mi ricevis la unuan bitigitan dokumenton, infana kanto nomita *Le Petit Oiseau* (La Malgranda Birdo). Kia ekscito! Jen muziko, verŝajne kiun neniu aŭdis ekde pli ol jarcento!

*Le Petite Oiseau* estas simpla kvar-fraza kanto en 3/4-takto. Samkiel *La Espero*, ĝi komenciĝas per kvar-mezura enkonduko kaj uzas arpeĝojn por krei melodion. La unua frazo

**daŭrigo sur paĝo 4**

# Kolofono

*La Nov-Jorkia Esperantisto* raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto-Societo de Sirakuso.

**Redakcio**
Timothy Boronczyk
Zerbie Hynson

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retpoŝte al la redakcia teamo ĉe *novjorkio@syracuseesperanto.org.*

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe *syracuseesperanto.org/novjorkio.*

La kolofona bildo de la unua paĝo montras la Chimney Bluffs State Park. La parko situas ĉe la bordo de Lago Ontario en la Kontono Wayne. Antaŭ dek mil jaroj, glaĉeroj antaŭeniĝante de Kanado formis argilajn montetojn, kiuj nomiĝas drumlinoj. Erozio akre pintigas la drumlinojn, el kiu la plej altaj atingas ĝis 53,3 m. Kvankam ĉi tiuj klifoj ekzistis dum milobloj da jaroj, ili ĉiam ŝanĝiĝas. Park-oficistoj taksas, ke la erozio averaĝas po 0.5–1.5 m jare. Dum Prohibicio, kontrabandistoj uzis la lokon kiel bazo por liveri alkohol-ajn trinkaĵojn al Usono el Kanado. Foto de Melissa Brookmire.



Flugas la esperanta flago en Centra Parko (foto de Raúl J. García).

# Esperantistoj en Centra Parko

Raúl J. García, Esperanto-Societo de Novjorko

La 22-an de junio renkontiĝis Esperantistoj en Centra Parko por ĝui la bonan veteron kaj verdan etoson. Vizitis nin Esperantisto el Hispanio, kiu nun loĝas en apuda ŝtato Nov-Ĵerzeo, Patricia R. Flugis nia verda standardo sub verda arbo kaj sur la verda herbejo de Centra Parko.

Ĉu unuafoje? Mi ne scias, sed certe tio estis interesa. Tamen, post kelkaj horoj, ni estis devigitaj de parka laboristo malpendigi ĝin.

Ĉu vi flugigas la flagon publike? Eble oni demandos vin pri Esperanto!

# Nova Esperanta Klubo ĉe Universitato Columbia

Raúl J. García, Esperanto-Societo de Novjorko

En septembro 2019 aperis nova klubo ĉe la universitato Columbia en Novjorko kiu nomiĝas Esperanto Society at Columbia University. Danke al la entuziasmo kaj agemo de doktoriĝanta studento Jonathan Reeve, studentoj (kaj aliaj) havas aliron al bonega renkontiĝejo en norda Manhatano.

Regule venas tri scivolemuloj ĉiusemajne kiuj lernas Esperanton pere de la Zagreb-metoda kurso. Ili ankaŭ lernas pri Esperantujo ĝenerale. Ni esperas, ke ni pli firmigos la klubon kaj pligrandigos ĝian partoprenantaron.

Publika ret-grupo kaj anoncoj estas troveblaj en Facebook. Bonvole sendu kuraĝigajn mesaĝojn aŭ filmetojn al *esperanto@columbia.edu*.

# Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

Raúl J. García, Esperanto-Societo de Novjorko

La Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) estas la pli vasta Esperantujo ekster mia hejmurbo, Novjorko. Mi klare memoras pri mia unua fojo ĉe ARE, ke ĝi estis la plej bona evento por esplori kaj ekkoni Esperantujon. Mi ne malŝparus tempon kaj monon, se mi decidus, ke esperantistoj estas la plej strangaj homoj en la mondo kaj ke mi ne volas esti parto de tiu grupo. Mi povus simple ĝui la aktivaĵojn kaj kampuson de la renkontiĝejo Silver Bay (Silvero). Jen kiel estas homo... ni atendas la plej malbonajn aferojn, ĉu ne? Ĉu nur mi? Nu, mi povas feliĉe raporti (kaj jam faris ĉe *verdapensaro.blogspot.com/2016/02/esperantujo-ce-are-22.html*) ke mi timis senkiale. La tuta sperto estis tre pozitiva! La grupo estis vigla, akceptema, bonvenema, kaj interesa!

Por tiuj, kiuj loĝas en Novjorkio kaj proksime, ARE estas la ĉefa renkontiĝo en Usono. Ĝi okazas ĉiujare, kaj ni pli malpli atendas, ke ĝi ja okazos venontjare se ne malhelpos tion iu naturkatastrofo. Se vi loĝas en Nov-Jorkio, Vermonto, Masaĉuseco, Konektikuto, Nov-Ĵerzeo, Pensilvanio, Nov-Hampŝiro, aŭ Rod-Insulo kaj havas aŭton, aŭ povas esti veturigata de iu kiu havas aŭton, vi estas tre bonŝanca!

Al la ĉi-jara ARE aliĝis 44 partoprenantoj. La plejmulto prezentis sin en la kutima konatiga programero, ĉi-foje nomita Amika Vespero. Mi ĝojis vidi multajn konatulojn kaj ankaŭ kelkajn novajn vizaĝojn.



Partoprenantoj en la konferenc-ĉambro dum la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (foto de Raúl J. García).

Ĉi-foje la renkontiĝo ĉefe okazis en salono de la nova konstruaĵo William Boyd Center, kiu malfermiĝis en aŭgusto 2018. Tamen, mi ne multe memoris ĝin, ĉar pasintjare mi tranoktis kaj manĝis en Oak Cottage (Kverko), kaj la programeroj okazis kiel kutime en Morse Hall. Mi entute eĉ ne eniris la konstruaĵon Boyd en 2018. Malgraŭ ia hezito pri oficeca konferenc-ĉambro, la ĉambro en Boyd tute taŭgis. Dirite tion, mi ja feliĉas, ke kiel grupo ni agnoskis preferon por Morse Hall, kaj verŝajne uzos ĝin en 2020.

La programo estis kaj sufiĉe konkreta por gvidi la partoprenantojn kaj sufiĉe leĝera kaj fleksebla por permesi lastminutan partoprenadon kaj ĝuadon de Silverio mem. Kernaj programeroj, kiuj donas okazon al komencantoj kaj parolemuloj uzi la lingvon, estis la Literatura Horo kaj la Oratora Horo. Tiuj okazis kun ne-atendite multa partopreno, kaj bone ĉar ĝuste tial ni estas tie!

Inter aliaj, estis kelkaj viglaj parto-prenigaj aktivaĵoj kaj prelegoj. Mi ne celas listigi la programon ĉi tie, sed sufiĉas diri, ke entute la programado kaj gvidado de ARE estis tre amuza kaj partopreninda.

Dankon al ĉiuj gvidantoj de tiu ĉi renkontiĝo, kelkaj videblaj kaj kelkaj kiuj laboris "malantaŭ la kurteno."

## Malkaŝita Muziko

daŭrigo de paĝo 1

estas malpeza kaj dolĉa, kaj mi eĉ trovis min senpense murmurante ĝin post kelkaj tagoj. La dua frazo enhavas neatenditan dieson, kiu povus indiki, ke DE MÉNIL intencis V V/V V kadencon (mi nur povas diveni pri tio ĉar la dokumento prezentas la melodion senharmone). Tio frapis min kiel interesaĵo ĉar la kanto estas por infanoj; mi atendis nur akordojn I, IV, kaj V.

La tria frazo respegulas la unuan pli ritme ol forme, sed ĝi ne estas neapartena. Tamen, la melodio fariĝas konfuziva en la lasta frazo. Mankas la interplektitaj kvaronnotoj kaj silentoj de la antaŭaj, kiuj kontribuas senson de "spaco" al la kanto. La frazo konsistas preskaŭ tute de okonnotoj, eĉ havas du deksesonajn, kaj aŭdas rapidigita. Mi tre ŝatas la komencon de la kanto, sed ĝia fino seniluziigis min.

Entute, mi ricevos preskaŭ 50 paĝojn de muziko de la arkivo. Do, kvankam tiu ekzemplo ne prezentas DE MÉNIL kiel elstaran komponiston, ankoraŭ restas multaj ekzemploj pliaj. Mi volas kredi, ke DE MÉNIL estas pli ol artisto de unu furorkanto.

Plie, tio, kio naskiĝis de scivolo, povas fariĝi konservada projekto. Depende je la aliaj muzikverkoj, kaj se sufiĉa intereso ekzistas, mi povas redakti kaj kompili la muzikon en libron, por ke Esperantujo rekonatiĝu kun la muziko de sia komponisto. Se vin interesas tia projekto, mi invitas vin kontakti min retpoŝte ĉe *tboronczyk@gmail.com*.

# Kluboj

**Binghamton Esperanto**
*facebook.com/groups/551200958567378*
estro Kelly BUNMAN
*tehkellymonster@gmail.com*

**Esperanto-Klubo de Bufalo**
*meetup.com/Buffalo-Esperanto-Club*
estro Franzo LUGLIO

**Esperanto Society at Columbia University**
*facebook.com/groups/1338197779676603*
estro Jonathan REEVE

**Esperanto-Societo de Novjorko**
*esperanto-nyc.org*
estro Raúl J. GARCÍA
*esperantosocietyofnewyork@gmail.com*

**Esperanto-Klubo de Roĉestro**
*groups.yahoo.com/EsperantoRochester*
estro Tomaso ALEXANDER
*salivanto@yahoo.com*

**Mohawk-Hudson Esperanto Club**
estroj Phyllis CLARK kaj Jonathan SAUNDERS
*mhesperanto.org*

**Esperanto-Societo de Sirakuso**
*syracuseesperanto.org*
estro Timoteo BORONCZYK
*mail@syracuseesperanto.org*

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

# Kalendaro

**Renkontiĝo de Binghamton Esperanto** okazas preskaŭ ĉiusemajne ĉe Starbucks (Front St). Datoj estas anoncotaj.
*facebook.com/groups/551200958567378*

**Renkontiĝo de la Esperanto Society at Columbia University** okazas ĉiusemajne ĉe Fayerweather 302.
*facebook.com/groups/1338197779676603*

**Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Bufalo** okazas ĉiumonate la unuan sabaton. Lokoj estas anoncotaj.
*meetup.com/Buffalo-Esperanto-Club*

**Komencanta konversacia renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko** okazas foje ĉe Panera Bread (Union Sq). Datoj estas anoncotaj.
*meetup.com/EsperantoSocietyOf NewYork*

**Renkontiĝo de la Mohawk-Hudson Esperanto Club** okazas ĉiumonate la duan ĵaŭdon.
*meetup.com/Mohawk-Hudson-Esperanto-Club*

**Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Roĉestro** okazas ĉiumonate la duan vendredon ĉe Starbucks (Center Pl Dr).
*events.duolingo.com/rochester-esperanto*

**Formala renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko** okazas ĉiumonate la unuan vendredon (krom somere) ĉe Community Church, 28 East 35th St.
*meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork*

**Renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Sirakuso** okazas ĉiumonate la trian vendredon ĉe Dunkin Donuts (W Genesee St).
*meetup.com/SyracuseEsperanto*

**Zamenhof Tago** okazos la 15an de decembro (kelkaj grupoj gastigos siajn proprajn festojn).

**Senkrokodila Semajnfino** okazos en Itako la 25-26an de aprilo.